




AVILAŬEN

ENHAVO

Januaro - 2000 - N° 23-a
ASTURIO

- 2....Nia Regiono
- 3....La poeto diservas en la meso de la vivo
- 4....Decibeloj
- 5....Perditaj kutimoj
- 6....La akuŝo de la Xana
- 7....Scienco kaj spirito
- 8....Flugilo en la vento
- 9....Mesagoj
- 10-11 Rondvojaĝo tra la reĝaj urboj de Maroko
- 12..Paskaj legendoj
- 13..La tri fundamentoj
- 14..Kelkaj konsiloj por plibonigi stilon
- 15..Amuzajoj
- 16..Zamenhofa Festo 1999a en Avilés



REVUO DE LA AVILESA ESPERANTO - GRUPO



NIA REGIONO

(ASTURIAS)

Oni trovas bizanciajn, romanikajn kaj gotikajn diptikojn. Kaj multe da grandvaloraj juveloj. Ĉi tiun templon envolvis la granda katedralo, ekkonstruita en la 14^a jarcento. La preĝejon oni konkludis en la 15^a jarcento. La poligonan supraĵon oni kovris per fantasta retablo komence de la 16^a jarcento, kaj al ĝi dediĉis sin la skulptoroj Giraltez kaj Balmaseda kaj la pentristoj Alonso de Berruguete, Picardo kaj Bingeles. Estis klostro de la 12^a jarcento, sed en la 14^a ili volis lasi al ni signoj de sia genio kaj ĝin anstataŭis per alia. De la jarcentoj 16^a ĝis la 18^a oni malfermis kapelojn sur la flankaj navoj, kaj ankaŭ la ambulatorion. Du turojn estis havonta la katedralo, sed nur oni konstruis unu, kiun, kvankam finita en la 17^a, plejparte oni faris en la 15^a jarcento. Malgraŭ ke ĝi apartenas al la flama gotika stilo ĝi ne malhavas sobriecon. Ĝi estas serena kaj eleganta, kaj prenas el la flama tiun ascendan graciecon kiun iĝas ĝin malpeza kvazau oraĵo.

La Redakcio

Estraro de ANTAŬEN

Honora Prezidanto: Nicolás Muñiz

Prezidanto: **Cezaro García**

Sekretariino: **M^a Luisa Menéndez**

Direktoreco kaj Desegno

revuo Antaŭen: **Císimo Rabanedo**

Kasisto: **Luis González**

Bibliotekistino: **M^a Isabel Murillo**

Gekomitatanoj:

M^a José Alvarez Faedo

David Menéndez

Eva González

Gene Alvarez

Lisa Ejarque

Daise Murillo

Nia adreso

Casa Municipal de Cultura

33400 AVILÉS

Asturias

Tfn 98 554 11 27

Subvenciita per la Registaro

de la Avilesa Municipo

Deposito legal:

Nº AS 1398 (9)

LA POETO DISERVAS EN LA MESO DE LA VIVO

Fragmento



Mi Konsekras:
Al ĉiuj, kiuj amas,
Al ĉiuj, kiuj sentas plenecojn novajn
En l'amo en la doloro – la vivo –
Al ĉiuj, kiuj songas,
Al ĉiuj, kiuj ploras,
Al ĉiuj, kiuj pensas,
Por ĉiuj, kiuj estas aŭ ne estas ili;
Por ĉiuj, kiuj scias pri la malfeliĉo en printempo
Kiam la floroj elfugas de l'cielo
Sur nian kapon
Kaj la etoso invitas nin al sia brulofero
De aromoj, kaj sur la tero
Jam floris ĉiuj la jasmenoj
Kaj aspiras de amo la freŝaj rozoj

Animoj }
Rozoj de lumo } Poetoj

Dio sanktoleis al ni. La miraklo prosperis
En via liro kaj al sia majesta ritmo
La spacego iluminiĝas per steloj
Kaj pro tio la vivo estas en festo

Verkis *Luis Menéndez LUMEN*

Esperantigis *M^a Luisa*

Menéndez.





LA DECIBELIOJ



Kiam oni diras ke la laŭtparoliloj, en la dancejoj eligas tro da “decibelioj” kaj ke la bruoj estas perniciozaj por la sano, kiam la instancoj kontrolas la decibeliojn eligitaj de la motoroj aŭ la hupoj de la aŭtoj, eble malmulte da personoj scias ke ili, ĉiuj, omaĝas al la inventisto de la telefono. La decibelio aŭ dekono de la “bel”, ŝuldas sian nomon al Aleksandro Grahan Bell, kiu naskiĝis en Edimburgo je la jaro 1847-a.

Konsiderante ke volumeno el 90 decibelioj estas malutila por la homa orelo, la “bel” estas jam pura intenco de murdo.

Bell elmigris al Kanado kaj, ĉar li estis profesoro pri Fonetiko kaj Parolmaniero, li decidis pligrandigi siajn instruadojn dediĉante ilin al la surduloj. Li eĉ konstruis artefaritan orelon, kiu kondukis lin la eltrovo de la telefono, je la jaro 1922-a.

Daisi Murillo
Lernantino



PERDITAJ KUTIMOJ (1^a)

La jaroj ne pasas senpage, kaj en tiu daŭra fluo forviŝas sin iom post iom la ŝpuroj de tiuj tradicioj kiuj dum tiom da tempo akompanis niajn oldulojn. En ĉi tiu vespero en kiu aperas en Avilés la unuaj malvarmoj kaj la pluvo lasas sin gliti sur la platŝtonoj de la stratoj kiuj tiom kaj tiom da rememoraĵoj konigis de tiuj pasintaj tagoj, kiam ankoraŭ la automobiloj ne estis alproprigintaj al si la vilaĝon kaj malantaŭ la muroj kiuj ĉirkaŭiris la lavejojn supreniris liberaj la kantoj de la virinoj kiuj, tiel strebe, blankigis la vestaĵon.

Ĝuste je tiu ĉi tempo, apud la varmo de la braĝoj kiuj rostis la unuajn kaŝtanojn, mia avino rakontis al ni tiujn aĵojn kiuj, siavice, estis rakontinta sia avino antaŭ longe. Ŝi parolis pri la tagoj kiam tiu blanka hararego, kiun nun ŝi kombis en hartubero ligita al la nuko, dividis sin en du dikaj nigraj plektaĵoj kun verdaj rubandoj.

La temo estis la malplej grava afero. La celo estis rememoro. Tiel, gvidataj de ŝiaj vortoj, ni trairis la havenon kiu tiutempe estis pli malgranda, ĉar oni ankoraŭ ne estis ŝtelinta tiom da tereno al la maro, kaj la estuaro havis pli mallarĝan fluejon kaj tial nur povis iradi malgrandaj velaj ŝipoj kiuj, se enirintaj iom trans la ponto San Sebastián, baldaŭ fundotuŝis. La knaboj amuziĝis kaptante krabojn aŭ naĝante ĝis la akvobordo. Ŝi, malpli kuraĝa, prenis la barkon kiu, glitante malrapide sur la tiam pura akvo, lasis la momentajn vojaĝantojn en San Xuan de Nieva. Al ni tre amuzigis imagi la fiŝvendistinojn defiligante siajn komercaĵojn plenvoĉe sur la stratoj kaj pensi pri la oftaj kvereloj kiuj tuj komencis pro la rabato de iuj moneroj. Same surprizis al ni la kutimo, jam malaperinta, meti al la viraj filoj la nomon de la unua ŝipo enirinta la havenon je la Kristnasko.

Teresa Gutiérrez

LA AKUŜO DE LA

XANA (*)



En kaverno situanta en La
Cogolla –monto

Naranco, Oviedo-*xana*
havis dolorojn pri

akuŝo kaj ŝi ekkriis. En

tiu-ĉi momento juna

kudrantino kiu eniris

Oviedon, aŭdis la kriojn de la

xana kaj, kurioza, rigardis

internen de kaverno. La *xana*, vidante la junulinon en
tiel danĝera momento, petegis helpon al ŝi. La
kudrantino helpis la *xana*, kiel ŝi povis kaj la *xana*
havis feliĉan akuŝon.

Tiam la *xana* diris al la knabino: “Mi deziras pagi al vi
la favoron; do prenu la juvelojn aŭ vestaĵojn kiujn vi
preferas el tiuj kiuj estas sur la tablo.

La kudrantino nur prenis tondileton el oro.


Ludoviko

(*) *xana* = astura feino

SCIENCO KAJ SPIRITO



La germana nordamerika, kreanto de la Saturno V, homojn al la demandita progreso, inteligenton kaŭzas al li ĉu li kredas la animo. La scienco malaperas. animo reduktiĝi al estas senmortaj.




scienisto, naciita

Wernher von Braun, raketo V-2 kaj de la kiu alportis la luno, estis ofte ĉu la teknika kiu pravas la de la homo, ne perdi la fidon, kaj je la senmorteco de


pruvis ke nenio Do, la vivo kaj la ankaŭ ne povus nenio kaj, do, ili

María José Álvarez Faedo



FLUGILO EN LA VENTO

Vi foriris sen alveni, kiel tempesta ondo starigita meze de la maro kiu ne atingis la sablo. Mi scias tuto de vi estas la lumo, kiun pli mi devu tuton scii? Vi dronigis mian ŝipon en marbato, fulmo el furio, kaj internen de la maro, al paneo vi forlasis min, sur malpeza bargo kiun la vento kondukas al la rando el via sonĝo trans la arda krepusko, kie la maro plilarĝigas sian uteron por okuŝas navigistojn de esperplena ekzilo.



Ŝippereulo de via haŭto, mi trairas vian talion en koncentraj randoj, spiralo de pario, kirlovento kiu trenas min kaj ĝi iun tagon glutas min ĝis la plej profunda el viaj akvoj. Tie, mi trinkos vin, kun arda pasio la ruĝo flamante en via rigardo, ĝis satigi mian soifon per la konvulsa agonio el via voĉo, aera sprono de la amo en miaj visceroj.

La asenco de l'amo estas ununura, liberigita je la leĝoj de la tempo kaj de la geografio de la korpoj. Ĝi altrudas siajn tiranajn planojn ĝis la sklaveco de siaj servutuloj, ĝis la tuta ekliso de la racio, ĝis malproksimiĝi komplete de la kutimoj kiujn sen pli flugilo en la vento.

Flugu alta, ĝis atingi la spegulon el mia vizaĝo, kaj rigardu vin; viaj okuloj ankraditaj kiel paperaj ŝipoj en la blua blaseno el mia rigardo. Verŝu vian lumon sur mia esteco, bruligu min per via lumo kaj ekdormu poste sur mi inter miaj brakoj furioza ondo d'amo sur la tablo.

DAMEGO

MESAĜOJ

Ĉijare nia esperanta grupo ANTAŬEN ne povis celebri la Zamenhof-tagon plenaj je gajeco kiel ni kutimis. En la sama tago elektita por festi tiun laŭdindan eventon forpasis nia Prezidanto – Niko- post suferi subitan kaj akran infarkton. Kia fataleco!

Li estis fondinto de nia grupo ANTAŬEN je la jaro 1987 kaj de tiam li, ĉiam afabla, laboris kaj laboris por ke la avilesa loĝantaro konu la gravecon de la Internacia Lingvo.

Ni ĉiuj neniam povos forgesi la mirindan laboron kiun li plenumis en nia urbo favore al la disvolvado de Esperanto. En la pensoj de ĉiuj liaj avilesaj
gelernantoj brilas
ideo: ĉiuj daŭre
Tio estos nia
Prezidanto Niko.
ni ĉiam

gesamtideanoj kaj
kun propra lumo la sama
laboros por Esperanto.
omaĝo al nia tre bona
Ni ĉiam kun vi,
ANTAŬEN.

M^a Luisa

MI DOLORAS



Nia Prezidanto, la Prezidanto de nia Esperanta grupo ANTAŬEN, forpasis la pasintan 19-an de decembro, ĝuste kiam ni celebris la Zamenhof-tagon.

Li komencis en Avilés la iradon de la esperanta movado kaj ankaŭ li metis en ni la esperantan semon. Mi dankas lin por esti tia kia li estis, kaj doni tiom kiom li donis al mi. Mi scias ke li daŭre zorgas pri ni kaj ke li ĉeestos niajn esperantajn kunvenojn ĉar ni neniam forgesos lin. Ankaŭ mi dankas vin por esti mia amiko.

Ĝis ĉiam, Niko.

Cisimo

RONDVOJAĜO TRA LA REĜAJ URBOJ DE

Niaj Geomikoj:

MAROKO

Meze de februaro ni havis grandiozan vojaĝon volonte ni nun donas kelkajn interesajn impresojn por vi:

Unu horon, antaŭ ol ni atingis Casablanca ni vizitis nian unuan "Souk", t.e. loko kun grandaj muroj, inter kiuj okazas la merkato. Tiuj ĉi "Souk-oj" survoje troviĝas sufiĉe

malproksime de vilaĝoj, ekz. 30 kilometrojn.

Oni tie komercas per tre diversaj aĵoj, spicoj, legomoj, fruktoj, viando, bestoj, vestaĵoj ktp. Sed tie ankaŭ troviĝas dent-elŝiristo!.

Krome la souk

anstatatŭas por multaj vilaĝanoj la mankantajn radion kaj televidon. Tie oni unufoje po semajno renkontiĝas, ekscias diversajn novaĵojn, invitas al festoj, ricevas la leterojn kaj gazetojn. Ĉiam la azeno estas la transportilo por homoj kaj varoj. Kaj ĉiuj havas sufiĉe da tempo!

Laŭ gvidlibro Fez estas la plej bela urbo de la mondo. Tiun ĉi pretendon ni ne povas substreki. Sed fakte ĝi vere estas la kultura centro de Maroko, posedas la plej malnovan islaman altlernejon



de la mondo kaj, UNESKO prenis ĝin en la liston “Kultura mondheredaĵo”. Tre interesa estis la promenado tra la Medina kun la multaj souk-oj de diversaj metiistoj. Oni povas rigardi kiel la metiistoj per mano produktas vestaĵojn (en malhela ĉambro sen kudromaŝino) tinkturas ŝtofojn kaj ledon, prilaboras kupron ktp. Ne plaĉis al ni, ke infanoj jam laboras tie, ekzemple ili tenas kaj turnas la tvirnon por la kudristoj, se tiuj kudras la specialan jelaban. Imagu la kapuĉo de tiu ĉi speciala mantelo ankaŭ estas ujo por transporti varojn aŭ por kaŝi tie donacojn por la geinfanoj

La stratetoj en la malnova parto de Fez estas aparte mallargaj, eĉ malhelaj, tamen de tempo al tempo oni aŭdas la alvokon “belag!”, kio signifas “Atenton!”, kaj ĉiu rapidegas al la dommuroj, ĉar venas azeno kun varoj kaj bezonas sufiĉe da spaco. En Fez eĉ estas “oficistaj azenoj” ĉar ili portas la rubaĵon de la stratoj. Sed ankaŭ la nova parto de Fez (el la 14^a jarcento) havis por ni gravajn vidindaĵojn, ekzemple la enirejon al la reĝpalaco kaj -laŭ nia gvidisto – la trian plej belan straton de la mondo post Sevilla kaj New Orleans. Ĝi vere estas sufiĉe bela. Marrakech troviĝas en belega palmoazo (estas 150.000 daktilpalmoj!) kaj havas ruĝajn domojn, impresa aspekto. La minareto de Koutoubialamoskeo havas 70 metrojn kaj estas la modelo por ĉiuj marokaj minaretoj, krome por la Giralda en Sevilla. Kompreneble en Maroko ni ofte pensis al nia vizito en Andaluzio, tiun ĉi regionon ni ambaŭ ege ŝatas. Kaj la andaluziaj kahelojn kaj konstrumanieron ni ofte gaje vidis en la reĝaj urboj de Maroko.

Kunlaborantoj: Edith kaj Horst Plümecke
Magdeburg (Germanio)

PASKAJ LEGENDOJ

“la saĝaj infanetoj ricevos paskajn ovojn, anoncis ekzerge infanfabelo”

Kiu alportas la ovojn?


Ĉu estos la sonoriloj, kiu ekde la sankta jaŭdo forflugas al Romo, kaj realportas la ovojn kaj metas ilin en nestojn?, aŭ estas la paska leporo, kuniklo?

Tio estas laŭ la regionoj, landoj. Sed la paska leporo estas atestita, en Alzaco, por la unua foje en la jaro 1572.

Tute certe estas ĝi !

La mito de la kuniklo alportanta paskajn ovojn venus de germana legendo. Jen ĝi!

Maljunulo,
frandaĵojn por siaj
farbi ovojn el ĉiuj
ie ajn en la
Frumatene la
ĝardenon, kaj
maldekstren, por



tro malriĉa por aĉeti
infanoj havis la ideon
koloroj kaj kaŝi ilin
ĝardenon.
infanoj iris en la
kurante dekstren
malkovri

donacetojn.....Subite, kuniklo saltis el nesto! La infano kriis “la kuniklo demetis ovojn! belegajn pentritajn, koloritajn, por nia surprizo!.

Ne plu dubu, estas la kuniklo, la paska leporo, kiu alportas ovojn!

Ĉiel ajn, la alzacaj infanoj ne tiom donacojn postulas, kiam ili atendas la paskan leporon, kiu demetas kolorigitajn ovojn kaj...ĉokoladajn kuniklojn!

La kutimo donaci reciproke paskajn ovojn, je diversaj koloroj, estis notita de la Egiptaj kristanoj en la X^a kaj XII^a jarcentoj, de kie la supozo ke ĝi estus importita en Eŭropo dum la krucmilitoj. La unuaj tekstoj, kiuj aludas al tiu kutimo en Eŭropo datumas de la XV^a kaj XVI^a jarcento kaj koncernas nur Alzacon. Tamen Alzaco ne provizis pli da soldatoj ol la aliaj regionoj. En la jaro 1522 ovopaskaj donacoj estis faritaj al la sendikoj en Alzaco. Strasburga verkisto skribis, ke, je Pasko oni tinkturis la ovojn : verda- ruĝa- blua.

Ne forgesu karotojn por la kuniklo, kiu tiom laboris por via plezuro.....

Odette Scheidel

(Francio)

Kunlaborantino

SUME LA TRI FUNDAMENTOJ DE LA HOMA EKZISTO ESTAS: (*)

1° ĈIU VIVANTA KONKRETA HOMO



2ª LA HOMARO

3ª LA KREANTA NATURO



En la sfero de la travivo ĉiu homo estas fundamento de sia mondo: persona, individua fundamento. La Homaro, kiel homa speco estas la totala homa socio, kvazaŭ sfero homtuta, La kreanta Naturo estas la transcenda kaj mistera fundamento de ĉio, de ĉiuj estaĵoj, fundamento de l'Universo. Nenia natura estaĵo estas fundamento de si mem. Sekve, la homoj ne kreis, sin car ili estas kreitaĵoj.

La strikte totala homa kaj nepra sfero estas la Homaro. Kie estas homo, tie estas la homaro. Neniu homo povas foriri el la Homaro. Nacioj, popoloj, rasoj, religiaj grupoj, klasoj, ĉiaspecaj partioj, k.t.p., ne povas esti la homa tutaĵo, ne povas esti homaj sferoj. Ili estas nur homaj sektoroj; ja normale estimindaj, kondiĉe ke ili ne interdisputu, ne interbatalu, por superregado aŭ por altrudi al iu ajn alia homa sektoro.

Konsekvence, ĉiu(j) homo(j) kaj ĉiuj homaj sektoroj devas centriĝi, akorde kaj frate, ene de la Homaro kaj ne devas fali en etnocentrismon, eklezicentrismon ian ajn grupanisman. Tio estas sektorismo, kvazaŭ sektismo, ĉar tiaokaze ili descentriĝas, preferas malorde la parton al la tuto, tipa karakterizaĵo de ĉiaj idolismoj, de ĉiaj fanatikismoj.

Post nia rigardo al la tri fundamentoj de la homa vivo, etendu nun nian rigardon ne nur al la diritaj fundamentaj realoj, sed al la tuta realo de la homa ekzisto.

Kvin sferoj konstituas por ni, homoj, la tutan realon;

1ª Ĉiu konkreta homo. 2ª La Homaro. 3ª Tero kaj Vivo. 4ª La Sunsistemo. 5ª La Universo.

Imanenta kaj transcenda al tiuj ĉi kvin sferoj estas la kreanta Naturo.

Ĉio en la Universo estas ligita kun ĉio. Tiu ĉi universala ligo, interligeco, estas la pulso de l'Universo. Kiam oni komprenas kaj konscie sentas tian ligon, tio estas re-ligo, religeco, kosma solidareco. Alivorte; kara kaj racia, libera universala religio, celante kaj esperante la bonon de ĉiu kaj de ĉiuj, la vera kaj adorindan Bonon

Kunlaboranto: *Jesus Raposo*
Valencio-Hispanio

(*) El la libro "Homa, Homa, Kreanta Naturo"

KELKAJ KONSILLOJ POR PLIBONIGI STILON

Se vi anstataŭas substantivon per pronomo, do uzu lin korekte.

Ne forgesu akuzativo kaj uzu ĝi ĉie, kie necesas

Tamen superfluan akuzativon ne devas aperi en viajn verkojn.

Ne trouzu je la prepozicio "je", ĉar se vi kulpos je tio, oni taksos vin je malbona esperantisto

La sama rimarkumo rilatas al la sufikso "um" se vi, vortumante vian

cerbumaĵon, ne povumas trovi pli taŭgan solvumon, vi estas fuŝumisto!

Nekompletaj frazoj-----malbone!

Uzu nur simplajn kaj klarajn frazojn, ĉar se vi estus uzanta komplikajn

konstruaĵojn, vi povos esti forgesanta, pri kio vi devis esti rakontonta, kaj la

legontoj estos perdantaj la tutan intereson al vi..

Kio koncernas ne finitajn frazojn.

Nekonvena metaforo similas abomenan bufon, kiu per siaj . nigraj flugiloj

ŝirmas lumon de la kristale pura fonto , do indas ĝin elsarki.

Malgranda rimarko pri ripetadoj, kiuj fojfoje aperas en verkoj versaj kaj prozaj, kiuj estas publikigataj en gazetoj kaj libroj, kiuj estas eldonataj ĉe ni kaj eksterlande , kiuj sufiĉe malklarigas la penson , kiun voli eldiri la aŭtoroj , pri kiuj ni volis fari tiun ĉi rimarkon.

Laŭ nia profunda konvinko , ni opinias, ke la aŭtoro, kiam li skribas sian propran verkon . tutcerte ne devas agi laŭ tre malbona kutimo , kies esenco estas en tio, ke oni uzas tro multe da nebezonataj

kaj superflujaj vortoj , kiuj reale tute ne estas necesaj por esprimi la aŭtoran penson.

Ne elpensu tro longajn vortojn vi povas enembarasegiĝi, se ili estos neklare paroleblaj kaj miskomprenigantaj .

Se via verko estos hiperplena da redundaj neologismoj , ĝi aspektos turpe kaj hide , kaj oni etikedos ĝin mava.

Malbone sciante la gramatikon, komplikaj frazoj estos uzataj singarde!.


Superflujaj pronomoj , ili ne estas bezonataj .

Mallerteco de uzado de la prepozicio "de" povas esti kaŭzo de malapero de intereso de legantoj de via verko, S-anoj, bv. ne mllg.

Pri la ordo de vortoj sorgu nepre, ĉar la en Esperanto libera, rusan lingvon simile, de la vortoj ordo, el la neceso sian penson klare esprimi, ne liberigas.

Instruis **Valentin Melnikov**

El la rusa revuo "La Ondo de Esperanto"





- Ĉu vi aŭdis, Ĵan sabate edziĝis
- Ĉu pro amo au pro mono?
- La fianĉino prenis pro la mono,
kaj monon pro la amo

IVAN VARJUHIN
RUSIO

Vendisto- Tiu ĉi komputilo faros
la duonan de via laboro por vi.

- Bonege, mi aĉetos du

- Ĉu vi estas la estro de la
domo?
- Ne, oni ĵus metis lin en
la lulilon

Du najbaroj asociiĝis kaj aĉetis al si azenon.
Post kiam ili kondukis ĝin hejmen, la unua
demandis:

- Kiu duono estos via?
- Sed la azeno estas komuna ĉu ne?
- Jes, sed malgraŭ tio, ni devas scii kiu kiun
duonon posedas

Sen heziti la dua respondis:

- la antaŭa duono estos mia
- Konsentite - reiris la unua

Li purigis la muŝoj el sub la vosto kaj iris al
sia kunulo:

- Mi prizorgis mian parton. Nun vi iru aĉeti
avenon kaj zorgu bone nutri vian duonon, por
ke nia kooperativo bone marŝu.

VALENTIN GEORGIEV
BULGARIO

Viro diris al alia:

- Mia edzino estas ĝemelo.
- Kiel vi do povas distingi ilin de
unu alia?
- Tio tute ne estas malfacile. La
frato de mia edzino havas
lipoharojn

SYLVIA HAMALAINEN
FINNLANDO

KRITIKISTO- Mi ĵus legis vian
libron.

AUTORO- La lastan?

KRITIKISTO -Mi esperas ke jes.

PATRICIA KIRKIN
AUSTRALIO

-Vidu, kial multaj estas maraj
erinacoj ĉi tie?. Kaj en la prospektoj
estas skribite: "Strando, pri kiu
sonĝas multaj"

- Normale, sed ili forgesis aldoni
"fakiroj"

SAITATATASO TATULAS
HISPANIO

PETAĴO

Mi petas humorajojn el diversaj landoj por
publigi en ĉi tiu revueto. (mi antaŭdankas)
Sendu al:

CÍSIMO R. SIMON
c/ La magdalena nº 26 - 1º D
C.P.33400 - AVILÉS
ASTURIAS - ESPAÑA

Nueva edición de la revista de los esperantistas avilesinos

REDACCIÓN • AVILÉS

La Asociación Avilesina de Esperanto acaba de sacar a la luz un nuevo número de su revista Antauen (Adelante). Todos los miembros del Grupo dedican este número con la mayor emoción, gratitud y respeto a su presidente, Nicolás Muñiz, que falleció súbitamente el pasado mes de diciembre, cuando se daban los últimos toques a este número 23 de la revista presentada por los esperantistas avilesinos.

En esta ocasión, como ya suele ser habitual, figuran los trabajos de numerosos colaboradores. Así, la portada ha sido realizada, como en las ocasiones anteriores, por Císimo, representando el dibujo un rincón del parque de Ferrera, zona en la que los esperantistas avilesinos confían en poder colocar una placa con el título Glorieta del Esperanto, petición que ya han trasladado al concejal de Cultura.

En las páginas interiores se

publican los trabajos de Luis Menéndez «Lumen», una poesía traducida por María Luisa Menéndez, además de los de Daisy Murillo, Luis González, María Teresa Gutiérrez, Damego, María J. Álvarez Faedo, finalizando con la página de mensajes, dedicada a su presidente y escrita por María Luisa y Císimo.

Entre los colaboradores extranjeros figuran trabajos enviados por los compañeros de Siberia, Alemania y Francia, así como una colaboración de Jesús Raposo, de Valencia. En la página de humor figuran trabajos de esperantistas de Australia, Rusia, Polonia y Gijón.

Esta revista, que con tanto interés hacen los esperantistas avilesinos, es enviada profusamente a todos los rincones del mundo, y así se habla de Avilés, como una ciudad acogedora. Por este motivo, no es de extrañar que un tailandés pida la receta del Bollo de Pascua o un japonés se interesa por la famosa sidra asturiana.



PROVISORA PROGRAMO

Dimanĉo 14^a. Decembro 1997-

Zamenhofa Festo en Avilés

-0-0-0-

Unu fojon plian avilesa grupo "Antaŭen" celebros la 138-an. datrevenon de la naskiĝo de D-ro Zamenhof, aŭtoro de neŭtrala lingvo Esperanto,

La programo pretigita tiu-ĉi jaro estas la jena:

11'30-a. horo Sankta Meso-en Esperanto- en la kapelo "Jesuo de Galiana"

12'30-a. horo Kultura agado, kiu okazos en la "Domo de Kulturo", laŭ la jenaj partoprenantoj:

1^o Lisa Ejarque Alvarez interpretos la poemeton : "Vi Kantu".

2^o Nicolás Muñiz parolos pri la libro de Juan Carlos de la Madrid titolita: "Avilés mil jarojn pri Historio".

3^o Du gelnantoj de aktualaj kursoj: Daisi Murillo kaj LuisGonzález interpretos skecon titolita "Freŝa fiŝo".

4^o Prelego de Santiago Mulas, prezidanto de Astura Esperanta Asocio.

5^o Maria Luisa Menéndez, prezentos la tutajn partoprenantojn.

14'30-a. horo : frata bankedo en fama avilesa restoracio "La Estaca", strato Llano Ponte, 25.-

Ĉiuj la membroj de Antaŭen profitas tiun-ĉi okazon por deziri al vi FELIĈAN KRISTNASKON 1997 kaj FELIĈAN NOVJARON 1998.

Telefono por sciigi vian ĉeeston 98-554 11 27

Menuo

1^o.-Supo el krustuloj, aŭ Paeljo, aŭ Kuko el miksitaj fiŝoj

2^o.-Pimentoj farĉadoj el krustuloj, aŭ Soleo farĉado, aŭ Eskalopetoj kun froma fromaĝo aŭ Koteletoj el ŝafo.

3^o.-Deserto, pano, trinkajo, kafo..

Prezo: 1.400 pesetoj.